



**Numero 2024:08, februaro 15.** Pezo: Word 40, PDF 245 KB, sume 285 KB

## Venu al la 90-a Itala Kongreso en Montecatini Terme

Ĉu vi sopiras la kombino de esperantismo kaj ripozado? Partoprenu la spektaklan Italan Kongreson de Esperanto en Montecatini Terme, de la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto 2024. Montecatini Terme, kiel Monda Heredaĵo de Unesko, ofertas pli ol nur kongresan sperton. En tiu ĉi urbo, kiu jam en 1770 kanaligis siajn varmajn akvojn por ilin uzi kuracocele, kaj fine de la 19-a jarcento lanĉis la modernan koncepton de varmakva kuracado, tiam renovigante la urbon por igi ĝin unu el la plej karakterizaj ekzemploj de la secesia stilo *Liberty*, kaj kie unu el la plej antikvaj surrelaj kablotraĵoj, funkcia ekde 1898, portas vin de la moderna urbo al la mezepoka fortres-vilaĝo, vi havos la unikan ŝancon ĝui la internacian Esperanto-etoson, kaj ankaŭ ripozi kaj ekskursi tra Toskanio, la regiono de Pisa (45 km), Florenco (48 km), Pistoia (13 km), Lucca (25 km), Massa (70 km), kiujn vi povos viziti per la kongresaj ekskursoj tra monumentoj, muzeoj, kasteloj, grotoj kaj Esperanto-bibliotekoj.

Montecatini Terme facile atingeblas jam de 1853 per la Leopolda fervojo kiu kunligas la havenurbon Livorno kun Pisa, Lucca, Pistoia, Florenco. Nuntempe uzeblas la flughaveno de Pisa aŭ Florenco. La transnacia seria retejo 'La Grandaj Termo-banaj-urboj de Eŭropo' inkluzivas grupon de 11 urboj de 7 eŭropaj landoj (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Italio kaj Britio), konsiderataj de Unesko kiel la plej reprezentaj lokoj de eŭropa termo-bana agado. Aliĝo: [kongreso.esperanto.it/90](https://kongreso.esperanto.it/90)

## ILEI proponas al vi kongresan bukedon!

Tiu propono venos per la venonta Zoom-evento de ILEI, kiu okazos la 20-an de februaro 2024 je la 21.00 UTC+1 (horo de Roterdamo kaj grandaj partoj de Eŭropo). La organizantoj de la kunvenoj prezentos la eblon kongresumi tra la mondo:

- **90-a Itala Kongreso** en Montecatini Terme (Italio) 24-a / 31-a aŭgusto 2024
- **47-a IJF** en Serrada di Folgaria (Italio) 27-a marto / 2-a aprilo 2024
- **Eŭropa Esperanto-Kongreso** en Strasburgo (Francio) 8-a / 12-a majo 2024
- **109-a UK** en Aruŝo (Tanzanio) 3-a / 10-a aŭgusto 2024
- **80-a IJK** de TEJO en Ŝventoji (Litovio) 18-a / 25-a aŭgusto 2024
- **57-a ILEI-kongreso** en Maceio (Brazilo) 20-a / 27-a julio 2024

La evento okazos en Esperanto: <https://us02web.zoom.us/j/87460486399>;

Laura Brazzabeni, ILEI - Kongresoj

## Premio La Torre revivigita de ILEI

Omaĝe al Profesoro Mauro La Torre (1946 – 2010), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kunlabore kun la familio La Torre, anoncas konkurson pri esplorkonkurso en unu el la kampoj, en kiuj li laboris. Profesoro La Torre estis Prezidanto de ILEI (1998 – 2003). En 2011 la Komitato de ILEI elektis lin honora membro de ILEI. La esplorkonkurso por la konkurso estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj de interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidatoj anoncu sin ĝis la **30-a de aprilo 2024**. La sinanonco: plena nomo, institucio, pozicio/posteno, esplorintereso, ĝisnunaj esplorspertoj.

La temo: titolo, konciza esplorplano, celoj kaj atendataj rezultoj de la esploro.

La Estraro de ILEI kaj la familio La Torre starigos juĝ-komisionon pri la proponitaj esplortemoj de la kandidatoj. Ĝi sekvos kaj pritaksos la esplorkomisionojn, kiuj devos esti dokumentitaj kaj priskribitaj per esplorraporto ampleksa inter 20 kaj 30 A4-paĝoj, ne jam publikigita nek planita por publikigo aliloke. Limdatoj:

Aprilo 15: Sinanonco/kandidatiĝo, 1 paĝo

Junio 15: Resumo kaj strukturo de la esplorraporto, 2 paĝoj

Sept 30: Skiza mezperioda esplorraporto, 3-5 paĝoj

Okt 31: Pritakso kaj konsiloj al la kandidatoj

Dec 31: Esplor-raporto, ne publikigita antaŭe nek planita por publikigo, 20-30 paĝoj

2025 Feb 28: Anonco pri gajninto

Ĉiu elemento estu sendita al <ilei.prezidanto@gmail.com>, kiu transdonos ilin al la familio La Torre, al ILEI kaj al la juĝ-komisiono. La gajnonto devos sendi naŭ paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo por la familio La Torre kaj gravaj Eo-bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI *Ni savu niajn semojn*.



La Premio La Torre konsistas el sumo de € 700 kaj diplomo. La sumo estos ĝirita al UEA-konto aŭ alia konto de la gajninto. Eventualaj bankokostoj estos subtrahitaj de la premia sumo. ILEI retenas la rajton aperigi en siaj publikaĵoj la gajnontan esplorraporton. La konkurso okazis jam tri fojojn, en 2015, 2018 kaj 2022. ILEI kuraĝigas studentojn en la fakoj rilataj al la konkurso, precipe magistrajn kaj doktorajn kandidatojn, adapti siajn ne publikigitajn laboraĵojn al la postuloj de la konkurso kaj kandidatiĝi por la premio.

Ahmad Reza Mamduhi, prezidanto de ILEI



## Senpage alireblas la januara revuo IPR

ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) eldonis la numeron 2024-1 de IPR (Internacia Pedagogia Revuo), kiu estas la oficiala organo de ILEI kaj regule sendiĝas al ĉiuj membroj de ILEI. Tiu ĉi numero estas libere elŝutebla ankaŭ el nia retejo ([https://www.ilei.info/pdf/lpr241-print\\_IUGUZqzqgGG.pdf](https://www.ilei.info/pdf/lpr241-print_IUGUZqzqgGG.pdf)).

IPR prezentas teoriajn kaj praktikajn instru-fakajn artikolojn, edukajn novaĵojn pri lerneja kaj universitata agado, recenzojn de lernolibroj kaj de alispecaj lernomaterialoj, organizajn informojn kaj intervjuojn kun gravaj Eo-instruistoj, verkistoj kaj artistoj. Ĉi-numere vi trovos informojn pri niaj rilatoj kun Unesko. Legu la revuon, disvastigu ĝin kaj, se vi ankoraŭ

informojn pri niaj rilatoj kun Unesko. Legu la revuon, disvastigu ĝin kaj, se vi ankoraŭ

ne estas membro de ILEI, bonvolu tuj aliĝi por la jaro 2024 aŭ ĉe via landa ILEI-sekcio aŭ rekte ĉe nia retejo [ilei.info](http://ilei.info). En la retejo vi trovas ankaŭ ĉiujn informojn pri ILEI kaj ĝia agado.

Ĉian bonon, Amike, ILEI-teamo

**SMG:** UEA simile disponigas senpage sian januaran numeron. Nun ILEI sekvas tiun bonan kutimon, por ke nia Eo-popolo povu pritaksi la kvaliton de la revuo.



## La ĉina drako

La jaro de la drako komenciĝis. En la ĉina kulturo, drako (龙) estas dia animalo kaj simbolas bonan aŭspicion. Ĉu en la literaturo kaj kulturo de via lando, drako simbolas tutmalsame? Ni bonvenigas vian kontribuon al nia projekto 'Rakontu pri drako en ĝia jaro'. Tiu ĉi projekto nome rakonti pri la bestoj en la jaroj laŭ la ĉina tradicia kalendaro komenciĝis en 2020. Ni jam prezentis la jaron de la bovo, tigro kaj kuniklo kaj la periodaĵo *Juna Amiko* aperigis raporton pri la projekto en la unua numero de 2023.

Kiel kutime, bonvole sendu al ni simplan tekston pri la figuro drako en via kulturo, ĉu en historio, ĉu en literaturo, en legendo aŭ mito, ĉu en arto, ĉu en

penetraĵo, aŭ kanzono, filmo, kutimo, manĝaĵo... Ĉiu formo estas interesa por la ĉina publiko kaj por nia Esperantujo, ni pensas.

Estus bonvene, se vi mem legus la tekstojn en Esperanto kaj en via nacia lingvo kaj sendus ilin en sonregistraĵoj kun la tekstoj. TEA tradukos ilin en la ĉinan lingvon kaj dum la Printempa Festo publikigos kiel kutime trilingvan rakonton kun viaj legaĵoj. Ĉino legos la ĉinan tradukon. Kontakto tra [<a.madella@tiscali.it>](mailto:a.madella@tiscali.it)

## Finna pionirino pri finnaj kuracistoj

Jen informo pri la apero de la anonco al finnaj kuracistoj pri la trilingva tradukhelpilo. Skribas Silvia Hämäläinen: "En mia domo loĝas geedza kuracista jam emerita paro. Ili donis al mi la ideon informi pri la projekto en la gazeto Lääkärilehti (Kuracista revuo), kiu aperas ĉiun duan semajnon kaj apartenas al la membreco de la Kuracista Ligo. Mi pensas, ke ĉi tiu kanalo estas bona por disvastigi la scion.

Mi sendis al la ĉefredaktoro mian mesaĝon iuvendrede. Samtage venis de li farita mallongigita informa teksto, kiun li petis ke mi legu kaj komenti. Mi ne komprenis, ke mi devis respondi samtage kaj tial restis grava eraro. La redaktoro komprenis, ke la tradukhelpilo estas celita al ukrainaj pacientoj, kaj ne al finnaj kuracistoj kaj helpantoj flegistinaj. Ne plu eblis korekti. Eble li ne kontrolis, kia aspektas la trilingva tradukilo. Se iu legas la informon ĝis fino, li/si komprenas la aferon.

La celita teksto aperis nun en la cifereca gazeto, do en reto sub informaj aferoj. Sube estas la per guglo tradukita teksto, kiu estas tre bona traduko.

## ILEI invitas vin al Maceio

Aliĝiilo jam estas ĉe: [2024.kongreso.org](http://2024.kongreso.org)

Ĝuu la filmeton kiu prezentas la ejon kaj la kongreson. Jen la ligilo:

<https://youtu.be/tdMIUySeqHI?si=DjMOazu35Kz8MQb8>

Laura Brazzabeni, Estrarano en ILEI pri kongresoj

## Jen nova oferto de Svisa Esperanto-Societo (SES):

Kunvenoj en ĉiu unua sabato de la monato, iom simile al la CDELI-aj StudSabatoj, kiuj okazadas ĉiun trian sabaton de la monato, surloke en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. La SES-Sabatoj okazos rete. Do restu trankvile hejme kaj ĝuu informriĉan momenton kaj okazon paroli nian lingvon. Ĉiuj detaloj kaj titoloj aperas en la retejo <[www.eventaservo.org](http://www.eventaservo.org)>. La unua tia sabato okazos la duan de marto!

Mireille Grosjean, prezidanto de SES

## 108-a AMO-Seminario: Semajno de Internacia Amikeco

sabato, la 24-an de februaro 2024, tempo: 14.00-17.00 UTC+1, Platformo ZOOM

- Enkonduko de Stefan MacGill: 'La rolo de solidareco en amikeco'
- Renato Corsetti (Britio/Italio): 'Semajno de internacia amikeco dum jarcento de internacia malamikeco'
- Vicente Manzano-Arrondo, Viko (Hispanio): 'Ĉu vere ni parolas la saman lingvon? Kion mi lernis amikiĝante en Esperantujo'
- Reza Kheirkhah (Tajvano): 'Kiel Esperanto rolis en la disvastigo de mia amikaro tutmonde?'
- Xiao Huoli (Ĉinio): 'Pri 40-jara korespondado kaj amikeco de ĉino Xiao Huoli kaj germano Dieter Laboga.'
- Fermo: Marija Belošević

Ĉiuj interesuloj povas aliĝi al: [hes.keu@gmail.com](mailto:hes.keu@gmail.com) ĝis la 22-a de februaro 2024. Al la aliĝintoj mi disponigos la ligilon al Zoom la 23-an de februaro 2024.

Marija Belošević, Kroatio

===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Eida Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>.